

Gerda Illerhues,
 Vespera krepusko
tradukita de Manfred Retzlaff

Vespera krepusko –
 Sinkas la sun’.
 Ombrojn ludantajn
 vidas mi nun.

Vespera krepusko –
 Susuras la vent’,
 fora ekrido
 en la silent’.

Vespera krepusko –
 Aŭdiĝis jen kri’,
 turmenta hastado,
 jam pasis nun ĝi.

Vespera krepusko –
 Eklumas la klar’,³
 dum noktoproksimo,
 de la stelar’.

Vespera krepusko –
 Tempo de l’ ben’,
 estonto tre foras
 kaj la maten’.

Vespera krepusko –
 ripoz’ ĉie ĉi,⁴
 paca trankvilo
 elmane de Di’.

*Traduko de la Germana poemo “Abenddämmern” de GERDA ILLERHUES (*1930) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2001-05-29.*

MR-351-1b / Arg-771-1548 (2013-01-16 18:18:18)

³aŭ:

Eklumas en klar’,
 dum nokt’ proksimiĝas,
 jen la stelar’.

⁴aŭ senrime:

ripozas la land’,
 paca trankvilo
 el Dia man’.